

TERMINOLOGIA SOMERA SKOLO (TSS) 2014

Aida Čižikaitė (aiduze@gmail.com)

En interreto aperis informo pri Internacia terminologia somera skolo en Vieno ĉisomere. Eh, estus interese..... des pli en mia ŝatata Vieno.....sed tiom kosta..... nu, bedaŭrinde.....

Tamen! Sekvis informo de UEA, ke estos aljuĝitaj eĉ du (!) premioj en la konkurso por studentoj. Jes – aperis Espero ;) . Post longa periodo mi jam estis decidinta reveni al Interlingvistikaj studoj en UAM, kiujn mi prokrastis pro certa kialo. Mia temo de fina laboraĵo ankaŭ koincidas kun terminologio. Ek!



Pretigado de vivresumo, listigo de motivoj, rekomendleteroj kaj senpacienca atendado.... Venis informo – mi estas unu el du gajnintoj. Kaj la dua estas Ariadna García Gutiérrez filino de mia kuba amikino Maritza!

Sekva surprizo – la trejnadon partoprenis ankaŭ Miglė Krūminaitė, filino de mia universitata kolegino. Nuntempe Miglė laboras en tradukista servo de Eŭropa Komisiono (EK). Ĉu povas esti pli bone? ;)

La studgrupo

Ĉijare kunvenis ĉirkaŭ 70 personoj. Laŭ oficiala statistiko, kiun ni vidis

La du filinoj

veninte kiel diagramon, estis ĉirkaŭ 40 landoj. Tamen plej granda parto de partoprenantoj venis el Luksemburgo – tradukista servo de EK, malgraŭ, ke inter ili estis ĉinoj, italoj, uzbekoj, nederlandanoj, irananoj k. t. p. Apud la diagramo ni mane faris liston de mankantaj landoj – ĝis pli malpli 20.

Kunvenis vere famaj terminologoj – en la rolo de instruistoj. Ni povis aŭdi prelegojn de universitataj profesoroj, kunlaborantoj de Infoterm, reprezentantoj de diversaj institucioj, proponantaj ilaron por terminologia laboro. Ne malpli valoraj estis mallongaj referaĵoj de partoprenantoj mem pri iliaj projektoj kaj laboroj.

Pleje ĝojigis familia etoso (kvazaŭ en esperantista kunveno.....) kie ni povis tute amike kaj senpere kontakti ne nur “studentojn”, sed ankaŭ profesorojn. Ankaŭ ĝojigis aŭdi multajn lingvojn kaj konvinkiĝi, ke partoprenantoj kapablas uzi po almenaŭ kelkajn. La plej valora estis eblo starigi personajn kontaktojn, amikiĝi kun profesiuloj kaj pensi pri kunlaboro en estonteco.

La kurso

La kurso celas personojn, interesiĝantaj pri terminologio. Veraj terminologoj, tradukistoj, teknikistoj, lingvistoj k. s. partoprenis. Plejmulto, kiel dirite, estis tradukistoj de EK. Tamen, venis ankaŭ personoj de diversaj enterpenoj, kiel ekz., Toyota, ĉar ili produktas kaj vendas siajn varojn en diversaj landoj, sekve bezonas multlingvajn retpaĝojn, en kiuj devas esti ĉio ĝuste tradukita, do terminoj ege gravas. Estis ankaŭ personoj, kiuj laboras pri maŝina tradukado, leksikografio, teorio, praktiko (kreado, adaptado, normigado de terminoj k. s.) kaj datumbazoj. Sperto vere grandega kaj ege valora. Eĉ se mi mem estas lingvisto, en du universitatoj partoprenis kurson de Terminologio, mem iom laboris en tiu tereno, mi tre multon lernis en la kurso. Kaj el tute alia vidpunkto ol ĝis nun mi havis eblon.

La kurso daŭris dum 5 plenaj tagoj inter la 9a matene kaj la 17a posttagmeze (nur la lastan tagon ĝis la 15a). Ni havis ankaŭ “terminologian matenmanĝon” – aldonan horon kun instruistoj kaj iu aldona prelego, diskuto, prezentaĵo. Duonhoraj kafopaŭzoj ankaŭ estis diskutado kun instruistoj kaj aliaj partoprenantoj. Tagmanĝa paŭzo (1 horo kaj duono) ankaŭ en grupetoj en apudaj restoracioj. Post fino de labortago, denove “feliĉa horo” daŭrigante kunestadon kaj diskutojn en apudaj restoracioj en grupetoj.



La unuan tagon ni estis dorlotitaj per belega bankedo. La lastan mi flustris al orelo de Gabriele Sauberer, direktorino, ke ni bezonas ne nur kafopaŭzojn, sed ankaŭ dancpaŭzojn pro longa sidado. Tiam ŝi malkaŝis, ke unu el niaj instruistoj, laboranta en Grandkanaria universitato kaj en Infoterm – Detlef Reineke – estas ankaŭ bonega dancisto de salsa. Tion li pruvis dum ceremonio de disdono de atestiloj: kun vera kubanino Ariadna ili faris prezenton. Espereble, en la sekvaj kursoj estos muziko dum ĉiuj paŭzoj kaj ĉiuj povos laŭvole “gimnastikumi”. ;)))

Ariadna kaj Detlef

Post la kurso ni ĉiuj ricevis atestilojn pri partopreno (studentoj povas utiligi ilin en siaj universitatoj kalkulante kiel ECTS poentojn (*European Credit Transfer System* – komuna poentsistemo por universitataj studoj en Eŭropo).

Fine de septembro okazos ekzameno (elementa kaj perfektiga niveloj), kiu ne estas deviga, ĉar ne estas parto de la kurso. Ekzameno, bedaŭrinde, estas aparte pagenda kaj multekosta..... Ekzamenoj okazos rete. Ni, ĉiuj partoprenantoj, ricevis aliron al Moodle sistemo por elŭti materialojn kaj fari teston por ekzameno por kuraĝigi nin (la vera ekzameno daŭros dum 6 horoj kaj enhavos 180 demandojn, ĉio en la angla, germana aŭ franca). Ĉiuj partoj de la ekzameno estis pritraktitaj dum la kurso, do, almenaŭ por elementa nivelo certe sufiĉus scioj.

La kurso ĉijare okazis ne en Viena universitato, sed en *nineteen business centre*. Tre bela, moderna, perfekte teknike ekipita ejo. Nia salono kaj ripozejo dum paŭzoj estis teretaĝe. Salono havis multajn seĝojn, kiujn ni povis movi laŭ niaj bezonoj por labori en grupoj, tamen mankis tabloj (aŭ almenaŭ apudseĝaj apogiloj por komputilo kaj/aŭ kajero), do estis maloportune uzi komputilojn aŭ ion skribi mane. Verdire, la rekomendo nepre kunporti komputilojn estis vana (ni ricevis informojn, ke ni havos taskojn en Moodle sistemo), ĉar por neniu el prelegoj ni bezonis ilin kaj materialojn elŭti eblis nur post la kurso (tiuj, kiuj havis komputilojn aŭ kontrolis retpoŝton, aŭ plonĝis en interreto pro diversaj kialoj).



La studgrupo

La lokon ni tre facile atingis per metroo dum 20 min. Loĝis ni en oportuna loko – hostelo *Kaiser23*, tre proksime de Okcidenta fervoja stacidomo (*Westbahnhof*), de kie tre facile atingeblas kaj flughaveno, kaj urbocentro, kaj Esperanto muzeo kaj ĉio alia.

Dankesprimo

UEA financis multon – vojaĝkostojn, restadon kun matenmanĝo, semajnan bileton por urba trafiko kaj aliĝkotizon. Dankon al UEA kaj TEC – sen ilia financa subteno neniamaniere mi havus eblon partopreni.



Dum vespermanĝo

Aparte Dankon al Mélanie Maradan, kiu venis al Vieno por bonvenigi nin kaj mem persone prizorgis pri ĉiuj praktikaj aferoj, ankaŭ dimanĉon pasigis kune kun ni promenante kaj ĝuante la urbon. Same por vespermanĝo en loka restoracio. Vera surprizo estis renkontiĝo kun antaŭa partopreninto de la kurso (TSS 2012) Olof Pettersson. Dum la semajno ni havis eblon vidi ankoraŭ kelkajn lokajn esperantistojn, viziti Esperanto muzeon.

Resumo

Se resumi per unu frazo – necesus uzi esprimon de Wera Blanke: “terminologie bongusta”. ;)